## HOTELOJ

**Hotelo CENTRUM *****
str. Kilińskiego 59/63, tel. (+48 42) 632-86-40, www.hotelsinlodz.eu
**Hotelo Orbis GRAND *****
str. Piotrkowska 72, tel. (+48 42) 633-99-20, www.orbis.pl
**Hotelo QUBUS *****
al. Mickiewicza 7, tel. (+48 42) 275-51-00, www.qubushotel.com
**Hotelo ŚWIATOWIT *****
al. Kościuszki 68, tel. (+48 42) 636-30-44, www.hotelsinlodz.eu
**Hotelo CAMPANILE ****
al. Piłsudskiego 27, tel. (+48 42) 664-26-00, www.campanile.com.pl
**Hotelo IBIS ****
al. Piłsudskiego 11, tel. (+48 42) 638-67-00, www.ibishotel.com
**Hotelo SAVOY ****
str. Traugutta 6, tel. (+48 42) 632-93-60, www.hotelsinlodz.eu
**INSTRUAD-KONFERENCA CENTRO**
str. Kopcińskiego 16/18, tel. (+48 42) 635-54-90, www.csk.uni.lodz.pl
**LERNEJA JUNULAR-GASTEJO**
str. Legionów 27, tel. (+48 42) 630-66-80
str. Zamenhofa 13, tel. (+48 42) 636-65-99
www.yhlodz.pl

## RESTORACIOJ

**A – DONG** – ĉina kuirarto,
str. Legionów 2, tel. (+48 42) 632-96-80
al. Piłsudskiego 92, tel. (+48 42) 676-26-35
**ANATEWKA** – hebrea kuirarto, str. 6 Sierpnia 2/4, str. Karskiego 5, tel. (+48 42) 630-36-35
**l'ECRU** – franca kuirarto, str. Karskiego 5, tel. (+48 42) 630-07-00
**KARCZMA** (Taverno) **U CHOCHOŁA** – olda pola kuirarto,
str. Traugutta 3, tel. (+48 42) 630-75-86, 632-51-38
str. Piotrkowska 200, tel. (+48 42) 637-09-19
**KLUB SPADKOBIERCÓW** (Klubo de Heredantoj) – internacia kuirarto,
str. Piotrkowska 77, la unua etaĝo, tel. (+48 42) 633-74-01, 633-76-70
**ORFEUSZ** – internacia kuirato, str. Narutowicza 43, tel. (+48 42) 631-98-06
**PIOTRKOWSKA KLUBO – 97** – internacia kuirarto,
str. Piotrkowska 97, tel. (+48 42) 630-65-73
**PIWNICA PLASTYKÓW** (Kelo de Plastikistoj) – str. Piotrkowska 86, tel. 0-503-349-384
**PIZZERIA TOSKANIA** – str. Piotrkowska 102, tel. (+48 42) 634-01-19
**RESTAURACJA POLSKA** (Pola Restoracio) – str. Piotrkowska 12, tel. (+48 42) 633-83-45
**RESTAURACJA VAROSKA** (Restoracio Varoska) – hungara kuirarto,
str. Traugutta 4, tel. (+48 42) 632-45-46
**SIOUX** – amerika kuirarto, str. Piotrkowska 62, tel. (+48 42) 632-14-36
**THE MEXICAN** – meksika kuirarto, str. Piotrkowska 67, tel. (+48 42) 633-68-68

## DANCEJOJ

**ELEKTROWNIA RP** – str. Karskiego 5, tel. (+48 42) 633-03-42, www.elektrownia1912.pl
**KLUB CABARET** – str. Tuwima 1/3, tel. (+48 42) 630-05-13, www.cabaret.pl
**PORT WEST** – str. Piotrkowska 102, tel. (+48 42) 632-56-06


## KLUBOJ / BIERTRINKEJOJ

**BAGDAD CAFE** – str. Jaracza 45, tel. (+48 42) 639-97-99
**BIBLIOTEKA** – str. Struga 7, tel. (+48 42) 633-76-77
**CAFE FOTO CLUB** – str. Piotrkowska 102, tel. (+48 42) 632-15-34
**FANABERYA** – str. Moniuszki 4a (enirejo el strato Traugutta), tel. (+48 42) 630-40-45
**IRISH PUB** – str. Piotrkowska 77, tel. (+48 42) 632-48-76
**JAZZGA KLUB JAZZOWY** – str. Piotrkowska 17, tel. (+48 42) 630-27-44
**LIZARD KING** – str. Piotrkowska 62, tel. (+48 42) 632-13-59
**ŁÓDŹ KALISKA** – str. Piotrkowska 102, tel. (+48 42) 630-69-55
**PERON 6** – str. Piotrkowska 6, tel. (+48 42) 639-80-19
**ROLLING STONE** – str. Moniuszki 6, tel. (+48 42) 633-65-41
**SIÓDEMKI KLUB** (Sepoj) – str. Piotrkowska 77, tel. (+48 42) 633-76-70


## KAFEJOJ / TEOTRINKEJOJ

**CAFE VERTE** – str. Piotrkowska 113/115, tel. (+48 42) 639-91-29
**CAFFE VENEZIA** – str. Piotrkowska 67, tel. (+48 42) 632-04-00
**COCTAILBAR, HORT-CAFE** – str. Piotrkowska 108/110, tel. (+48 42) 636-63-77
**COFFEES & TOFFEES** – str. Struga 6/10, tel. (+48 42) 637-61-48
**CUKIERNIA BLIKLE** – str. Piotrkowska 89, tel. (+48 42) 632-05-45
**DWA KSIĘŻYCE** (Du Lunoj) – str. Narutowicza 1, tel. (+48 42) 633-79-11
**FRESCO CAFE** – str. Piotrkowska 107, tel. 0-605-101-304
**NIEBIESKIE MIGDAŁY** (Bluaj Migdaloj) – str. Piotrkowska 200, tel. 0-609-511-484


**„Biała Fabryka" Ludwika Geyera** (Blanka Fabriko de Ludwik Geyer), nun Centralne Muzeum Włókiennictwa (Centra Teksindustria Muzeo) – str. Piotrkowska 282.
Oni konstruis ĝin en jaroj 1835 – 1839. La fabriko estis unu el la plej modernaj industriaj konstruaĵoj en Eŭropo.
En kolektaro de la fama en la mondo Muzeo troviĝas iloj, tekstilaj maŝinoj, historiaj teksaĵoj kaj vestaĵoj. La Muzeo organizas Internaciajn Triennale de Arta Teksaĵo.


8


**Księży Młyn** (Pastra Muelejo) – vasta fabrik – loĝeja kvartalo, kiun kreis familioj de Grohman kaj Scheibler, unue konkurantoj, kaj ekde la 1921 j. kunposedantoj, estrantaj per la plej granda en Eŭropo kotonfabriko. Ĉe la strato Tymienieckiego 5 troviĝas la plej malnova en la urbo industria establo, tiel nomata Bielnik Kopischa (Blankigejo de Kopisch) konstruita en la 1826 j. Laŭvicaj domegoj estis konstruitaj fine de la XIX jarcento. Strato Targowa alkondukos nin al la eksterordinara fabrika pordego nomita „bareloj de Grohman" kaj plue al konstruaĵoj de Scheibler. Grandega komplekso konsistas el ŝpinejo, remizo de fajrobrigado, fervoja stacidomo, hospitalo, lernejo, magazenoj, farmo, laboristaj domoj kaj palaco.


9


**Pałac Edwarda Herbsta** (Palaco de Edward Herbst), nun sekcio de Arta Muzeo – str. Przędzalniana 72.
Ĝi estas perfekta ekzemplo de rezidejo de riĉa fabrikanto kaj starantaj tie antikvaj mebloj montras inklinojn de lodzaj industriistoj, kiuj agis en la XIX jarcento. Teretaĝe troviĝas reprezentaj loĝejoj: balsalonego, spegula salono, manĝoĉambro, ĉasista ĉambro kaj japana kabineto. En la unua etaĝo oni povas rigardi familiajn ĉambrojn. Apud la palaco staras antaŭa domo de staloj, nun tie oni organizis ekspozicion de malnovaj kaleŝoj, karioloj kaj glitveturiloj.


10

**Pałac Karola W. Scheiblera** (Palaco de Karol W. Scheibler), nun Kinematografia Muzeo – Plac Zwycięstwa 1.
La ekstreman neorenesancan formon ĝi ricevis en la 1888 j. (projekto de E. Lilpop). Kvieta, eleganta fasado kontrastas kun la riĉa multstila interno. Stukornamaĵoj, pentraĵoj, mebloj, kamenoj, fornoj, lignotegaĵoj, drapiraĵoj kaj la venecia mozaiko faras neforgeseblan impreson. La muzeo kolektadas ekspoziciaĵojn ligitajn kun la historio de pola kinematografio. En la konstanta ekspozicio oni prezentas instalaĵojn indikantajn evoluon de filma tekniko. Tempaj ekspozicioj estas dediĉitaj al historio de filmo, al nuntempaj polaj superfilmoj kaj ankaŭ al la pola fotografarto kaj medio-arto.



11

**Pałac Oskara Kona** (Palaco de Oskar Kon), nun Ŝtata Filma, Televida kaj Teatra Altlernejo – str. Targowa 61/63.
En la Televida kaj Teatra Lernejo oni povas studi reĝisoradon, operatorarton, filmanimigon, aktoradon, fotografarton, filman kaj televidan realigon, filmmuntaĵon, filman kaj televidan produktadon, krom tio organizadon de ciferaj medioj.
La plej bona vizitkarto de la Lernejo estas nomoj de konataj diplomitoj: Andrzej Wajda, Roman Polański, Jerzy Skolimowski, Marek Piwowski, Krzysztof Kieślowski.



12


13


**Pałac Maurycego Poznańskiego**
(Palaco de Maurycy Poznański), hodiaŭ Muzeum Sztuki (Muzeo de Arto) – str. Więckowskiego 36.
La palaco estis konstruita en la stilo simila al itala renesanco. Ritmaj disdividoj de muroj, kolonoj inter fenestroj, anguloj, balkonoj, balustradoj, fantaziaj ornamaĵoj kaj belegaj vitraloj grave impresas vizitantojn. La muzeo estas fama pro la unika kolektado de avangarda arto, aro da verkoj de polaj kaj eksterlandaj artistoj ekde komenco de la XX jarcento ĝis nuntempa periodo. Tie ĉi troviĝas pentraĵoj, skulptaĵoj kaj artaj instalaĵoj de mondfamaj artistoj.


14


**Pałac Karola Poznańskiego** (Palaco de Karol Poznański), nun Muzika Akademio – str. Gdańska 32.
Arkitekturo de la palaco fondita en la 1904 j. (projekto de A. Seligsohn) similas al la florenca renesanco. Dank'al tio oni povas observi tie multnombrajn pilastrojn, rustikitan fasadon, dekoracian solidon, balustradojn, fantaziajn finpretigojn de fenestroj en la angulo. La palaco estas disigita de la strato per metala palisaro kun maskaronoj kaj litero „P" sur blazonoj. En la ovala, neobaroka ŝtuparejo oni povas admiri eksterordinare elegantan vitralon. Antaŭ vizitado de la palaco oni devas ricevi permeson de la akademia administrado.


15

**Willa Leopolda Kindermanna** (Vilao de Leopold Kindermann), nuntempe Miejska Galeria Sztuki (Urba Art-Galerio) – str. Wólczańska 31/33.
La plej bela en Pollando secesia vilao, konstruita en la 1903 j. por industriisto Leopold Kindermann (proj. de G. Landau--Gutenteger). Eksterordinare pitoreska formo de la konstruaĵo, asimetria, finita per kruta tegmento. Ĝia fasado estas dekorita per multnombraj secesiaj ornamaĵoj. Tie ĉi ni povas ektrovi stiligitajn florojn, arbotrunkojn, bestojn kaj fruktojn. Bonege oni ligis tie ĉi diversajn konstrumaterialojn kun la speco de stuko. En fenestroj de la ŝtuparejo kaj de la muzik-salono troviĝas multkoloraj secesiaj vitraloj.


16

**Wille Reinholda i Józefa Richterów**
(Vilaoj de Reinhold kaj Józef Richter) – str. Skorupki 6 kaj 10.
Du najbaraj vilaoj en la malnova parko. Pli grandioza el ili estis fondita en la 1904 j. (proj. de I. Stebelski), ĝi ricevis tre pitoreskan formon, en kiu ĉiu fasado estis realigita alimaniere. Vilao de Józef Richter estas pli aĝa, ĝi estis konstruita en la 1889 j. (proj. de P. Brukalski) kaj similas la tipan renesancan italan vilaon. En la historia parko ni povas trovi multnombrajn rarajn arbojn, inter ili grandegan kverkon nomitan: „fabrikanto".


17

**Cerkiew Katedralna** (Ortodoksa Katedralo) de sankta Aleksander Newski – str. Kilińskiego 54.
La katedralo estis fondita en la 1884 j. laŭ la projekto de Hilary Majewski, kiu donis al ĝi neobizancan karakteron, videblan en kopuloj kaj ornamarto. Tre riĉa interno posedas pitoreskan ikonostazon, belegajn antikvajn ikonojn kaj metalajn procesiajn standardojn.

**Obszar Litzmannstadt Getto** (Tereno de Litzmannstadt Getto)
Kreante getton en Lodzo Germanoj lokigis ĝin en la plej neglekta, norda parto de la urbo (kvartaloj Bałuty kaj Malnova Urbo). Ĝi estis la dua – post la varsovia getto – la plej multnombra amasigo de hebrea loĝantaro en Pollando.
En la momento de nuligo de la getto vivis tie 160.320 Judoj – ĉefe lodzanoj. En la periodo de la 17-a de oktobro ĝis la 4-a de novembro 1941 j. Germanoj fermis en ĝi 19.953 Judojn el Aŭstrio, Ĉehio, Luksemburgo, kaj Germanio.
Hodiaŭ la historion kaj administradon de la getto oni povas ekkoni promenante tra la tereno de Litzmannstadt Getto, komencante ĉe Bałucki Rynek.



18


**Cmentarz Żydowski** (Juda Tombejo) – la plej granda (41 ha) en Eŭropo tombaro de disĉiploj de la hebrea religio. Ĝi estis fondita en la 1892 j. kaj nun troviĝas tie pli ol 160.000 sepultejoj. Inter ili ni povas admiri verajn verkojn de arto kaj arkitekturo. La plej grandajn fondadis lodzaj industriistoj: familioj de Poznański, Silberstein, Prussak, Stiller kaj Jarociński. Pli malgrandajn tomb-monumentojn ni trovos sur tomboj de konataj kuracistoj, pledistoj kaj komercistoj. Tie ĉi troviĝas ankaŭ tomboj de gepatroj de Julian Tuwim kaj de Artur Rubinstein kaj etendita sepultaro de gettaj viktimoj.
**Synagogi w Łodzi** (Sinagogoj en Lodzo)
– nun en Lodzo troviĝas 2 sinagogoj: ĉe la str. Pomorska 18 kaj str. Rewolucji 1905 r., numero 28.


19


**Palmiarnia** (Palmo-Domo) – al. Piłsudskiego 61.
Oni povas admiri tie kolektadon da 4.500 ekzempleroj de diversaj plantoj, apartenantaj al pli ol 1.100 specoj kaj variaĵoj. Inter 65 botanikaj familioj la plej multnombre estas prezentitaj tie: Cactaceae, Crassulaceae, Euphorbiaceae, Araceae, Begoniaceae, Piperaceae, Marantaceae, Orchidaceae kaj Phylum Pteridophyta. Al la plej malnovaj plantoj apartenas palmoj, ĝia kolektado nombras 18 specojn. Inter ili oni povas ekvidi tie ekzemplerojn pli ol 130 jaraĝajn, altajn ĉirkaŭ 18 metrojn. La Palmo-Domo estas ĉirkaŭita per la historia parko Źródliska, kie kreskas 300-jaraĝaj kverkoj.


20

**Ogród Botaniczny** (Botanika Ĝardeno) – str. Krzemieniecka 36/38
La ĝardeno estas situita najbare al la vasta parko en la kvartalo Zdrowie. Sur la supraĵo 64,1 ha oni amasis tie kolektadon da ĉirkaŭ 3.500 specoj kaj variaĵoj de plantoj en sekvontaj sekcioj: sistematiko de verdaj plantoj, alpina ĝardeno, planta biologio, parka verdaĵo, ornamaj kreskaĵoj, kuracaj kaj industriaj plantoj , pola vegetalaro, arboretum kaj japana ĝardeno.
Najbare al Botanika Ĝardeno, ĉe la strato Konstantynowska 8/10 troviĝas **Miejskie ZOO** (Urba Zoologia Ĝardeno) kun ege interesaj diversspecaj bestoj.


21

**Manufaktura** – str. Karskiego 5, www.manufaktura.com
La kultura, amuza kaj komerca centro. Unika ne nur en la pola, sed ankaŭ en eŭropa skalo, projekto de revivigo ligas modernajn formojn kaj arkitekturon kun restaŭrigitaj XIX-jarcentaj konstruaĵoj de iama Izrael Poznański fabriko. En la 27-hektara ariĝo troviĝas inter alie: foirejo kun koloraj fontanoj – loko, kie okazadas festenoj, koncertoj kaj diversspecaj aranĝoj, Muzeo de Fabriko, restoracioj, pli ol 300 vendejoj, dancejo, kegloludejo, grimpmuro kaj multikinejo.


22

# Łódź

## turismaj atrakcioj

